

# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO
nº 9
53a Jaro Septembro 1974

# VERA KAJ FALSA PLURISMO

(Dum la ĝenerala aŭdienco de la 28a de aŭgusto, en la aŭlo de Castel Gandolfo, la Sankta Patro jene alparolis la multenombrajn diversnaciajn ĉeestantojn:)

Fratoj kaj Filoj!

Ni ne forlasos, ankaŭ ĉi-foje, la parolon simplan kaj familiaran, kiun ni rezervas al la konversacio dum la Ĝeneralaj Aŭdiencoj, eĉ se ni devas proponi al via pripensado terminon iom hermetikan, kiu lastatempe havis sukceson en la doktrina analizo, ankaŭ katolika, ĉar ofte ni parolas pri ĝi kvazaŭ pri formo liberiga kaj moderna. Ĉi tiu termino estas "plurismo". Ni ne intencas nun paroli pri la plurismo de la sistemoj filozofiaj aŭ politikaj; kaj eĉ ne pri tiu religia ekster la kristana sfero.

Plurismo, termino dusenca; nome, havanta duoblan signifon: la unua signifo estas tre bela; kaj ĝi rilatas al la fekundeco de nia katolika doktrino, kiu, konservante sinceran kaj profundan identecon de enhavo, kaj restante, do, strikte aliĝanta al sia unusenca realeco, al la "una fides", pri kiu parolas tiom klare kaj aŭtoritate la apostolo Paŭlo, posedas grandan riĉecon da esprimoj, por ĉiuj lingvo (ni memoru, ekzemple, la miraklon de la lingvoj en la Pentekosta tago); por ĉiu

aĝo kaj grado de la homa vivo; kaj ni ne povas preter lasi la multajn kaj preskaŭ ŝvebantajn voĉojn de la liturgio, kiuj konkuras kun tiuj doktrinaj, prezentante la konatan ekvacion inter "lex orandi" (leĝo de la parolo) kaj "lex credendi" (leĝo de la kredo); krome, ki el ni povus forgesi la neelĉerpeblan literaturan pro - duktaĵon, dokumentantan per si mem, ke la rigora observado de la doktrina normo, tute ne estingante la floradon de la fantazio kaj de la poezio, ĝin stimulas kaj fekundigas en mirinda kaj ĉiam nova plureco de for moj kaj de vortoj?

Ĉi tiu estas la plurismo de la katolika Eklezio, al kiu ni povas alskribi tiun eliĝantan el la esploroj de la personaj serĉadoj kaj de la apartaj esprimoj, al kiu la katolika doktrino invitas kaj la mistikulon, kaj la teologon, kaj eĉ la artiston, ĉiam kondiĉe ke ĉi tiuj kontemplantoj, ĉi tiuj studemuloj kaj ĉi tiuj semantikaj profetoj havu la Veron kiel leĝon kunnaskitan en la animo; tiun Veron, pri kiu la Sankta Spirito estas ja majstro, sed ĉiam laŭ la interpreta garantio de tiu Do ktrino de la Eklezio, al kiu Kristo konfidis la gvida - don de la lumo, de la parolo, de la aŭtentikeco de la kredo kaj de la komunio.

Ni povus kompari la doktrinan plurismon de la katolika Eklezio kun tiu de muzika orkestro, en kiu la plureco de la instrumentoj kaj la diverseco de iliaj re spektivaj partoj kunagas por produkti unu solan kaj mi rindan harmonion.

Kaj al tiuj, kiuj bildigis al si la katolikan dogmon,- kiu estas religia doktrino revelaciita de Dio kaj, kiel tia, deklarita de la Eklezio - kvazaŭ ĝi estus karcero de la penso teologia aŭ scienca, mi volus memorigi ki an certecon kaj kian vastecon de vero, kaj kian varieconde esprimo la katolika dogmo prezentas al la ho-

ma spirito kiel inviton al la pripensado kaj kiel ĝojon por la menso enkondukita laŭ la vojoj de la supernatura scienco pri Dio kaj pri homo. La teologoj, humilaj kaj kleraj, bone konas la altan valoron de tiu plej supera sperto. Al ili iru nia respektoplena kaj stimula saluto.

Fakte, por praktiki tiun didaktikan plurismon en la dogma unueco de la kristana doktrino la katolikoj ĉiam trovas antaŭ si la formulon de la Reformistoj antikvaj kaj modernaj: "sola Scriptura", kvazaŭ ili estus la veraj fideluloj de la religia unueco, kaj kvazaŭ la Sankta Skribo ne devenus, ĝi mem, de la Apostola Tradicio, kaj, eltirita el la apostola instruo, ĝi ne estus elmetita al la danĝero, tute reala, esti forlasita al la individua interpretado, senfine centrifuga kaj plurisma, nome al tiu "libera ekzameno ", kiu diserigis la unuecon de la kredo en la sennombran multoblecon de personaj opinioj, vane, aŭ arbitre, entenatan de "reguligita normo", t.e. de altruda interpreto eligita de la komunumo, kaj poste superita, ĝi mem, de la subjektiva inspiro, kiun la Sankta Spirito sugestus rekte al la animo. Tiel ke "la protestanta doktrino pri la libera ekzameno, aŭ pri la unika aŭtoritato de la Sankta Spirito, kiel aŭtentika interpretanto de la Skribo, malfermas la vojon al la plej radikala subjektivismo filozofia-religia". Ĉu el la unuiganta kaj celebranta plursimfonio de Pentekosto oni devus retroiri al la " konfuzo de la lingvoj", pri kiu la Biblio raportas al ni la misteran okazaĵon? Kian ekumenismon ni povus konstrui? kian unuecon de la Eklezio ni povus rekunmeti sen la unueco de la kredo? Kien irus la kristanismo, kien, eĉ pli, la katolikismo, se ankoraŭ nun, sub plurismo ŝajne valida sed neakceptebla, oni agnoskus kiel legitiman la diseriĝon doktrinan, kaj sekve ankaŭ eklezian,

kiun ĝi povas kunporti?

La vera religio, pri kiu ni ıkredas, ke ĝi estas la nia, ne povas esti konsiderata legitima, nek efika, se ĝi ne estas ortodoksa, nome deveninta de aŭtentika kaj unusenca rilato kun Dio.

Nian soifon pri vero kaj vivo povos kvietigi nek mal preciza, eĉ se emociplena kaj sincera, religia sento; nek libera spirita ideologio konstruita per aŭtonomaj personaj ellaboradoj; nek strebado por altigi al religia nivelo la tamen noblajn kaj pasiajn esprimojn pri lirika kaj morala sociologio de tutaj popoloj; nek la hermeneŭtikaj vivisekcioj celantaj atribui al la kristanismo originon naturan aŭ mitan; nek ĉiu alia teorio aŭ observado ne prikonsideranta la voĉon senfine misteran kaj ekstreme klaran, kiu resonis sur la monto de la transfiguriĝo kaj raportita al Jesuo, radianta kiel suno kaj blankega kiel neĝo: "Ĉi tiu estas mia amegata Filo, en kiu mi havas plezuron; aŭskultu Lin".

Ni beataj, se ni metiĝos en la nombron de la malgranduloj, kiuj kapablas aŭskulti tian voĉon, kaj antaŭĝui la feliĉon de la senmorta certeco.

Kun nia Apostola Beno.

trad.C.M-P.M.

EN LA KADRO DE la granda Universala Esperanto Kongreso de Hamburgo (1650 partoprenantoj) la diservo okazinta je la 28a de aŭgusto atingis rimarkindan reliefon pro la nombro kaj la ekumena aspekto de la ĉeestantaro. Entute kuniĝis proksimume 600 personoj kaj dek pastroj disvolvis la liturgion: du lokaj, 4 protestantaj kaj 4 katolikaj el malsamaj landoj. Gvidis la liturgion la prezidanto de IKUE, p. Longoni, kan

tis la kanthoro gvidata de pastoro A. Burkhardt, prezidanto de la Kristana Esperantista Ligo Internacia, predikis pastoro G. Brinkmann. Akceptis la fidelularon la preĝejo Gnadenkirche St. Pauli.

La aparta interreligia kunveno havis kiel temon: "Ĉu postmorta vivo?". Kaj tion pritraktis reprezentantoj de Adventistoj, de la Bahai-movado, de la Blanka - Frataro, de la Etika-movado, de la Evangelia Kredo, de la Katolika kredo (sac. F. Longoni), de Novrevelacio, de Oomoto kaj de spiritismo.

La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kunvenis sub prezido de la itala UECI prezidanto, P. Ciccanti kaj s.ro W. Mudrak (Aŭstrujo), kiuj raportis pri la sukcesa kongreso de IKUE-KELI en Langenhord, Germanujo, kaj pri fondo de Esperanto-hejmo en Rimini por emeritaj pastroj kaj laikoj. Oni decidis, ke la Kongreso de la Sankta Jaro 1975 okazos en Romo. Pri agado ĉe la skoltoj raportis p. Bourdon (Francujo) kaj donis informojn la ĝenerala sekretario de la Skolta Ligo .K. Hammer (Nederlando).

ROMA ESPERANTA VOĈO

n°132

LA IKUE-KONGRESO: 11-16 de aŭg. 1975, laŭ la propono farita en la ĝenerala kunveno de IKUE, okaze de la Universala Kongreso, estos, do, celebrata en Romo. Temas pri eksterordinara graco, kiun Dio volas doni al ni en ĉi tiu jaro de mizerikordo. Kiu ne volus dediĉi ĉiujn siajn zorgojn por profiti pri tio?
Kvankam mankas ankoraŭ iom malpli ol unu jaro al la granda evento, kompreneble ne atendu anonci vian aliĝon, ĉar pro la granda amaso da pilgrimantoj, vi riskus ne plu trovi loĝejon, malgraŭ la klopodoj de la organizoj tiucele kreitaj. Ĉi tiu kongreso estos certe memorinda en la historio de nia katolika esperanta Asocio. Fakte, ĝi estos evento, kiu dum malmultaj tagoj povos liveri al la partoprenantoj tian sumon da esceptaj ĝuoj religiaj kaj spiritaj, sed ankaŭ laŭ la turista aspekto, kian oni verŝajne ne povos ricevi en neniu alia tempo.
Niaflanke ni ne ŝparos zorgojn, por ke niaj IKUE-anoj ricevu la plej profundan ĝojan impreson el ĉi tiu pia vizito al Romo, kiu, metante ĉiujn apud la granda tutmonda familio, antaŭ la komuna Patro, Vikario de Kristo, kaj tuŝapude kun la plej emociaj atestoj de nia kredo, fariĝos impulso al pli fruktoriĉa kristana vivo por la persona progreso, por la socia, rilate al la medio en kiu ni vivas kaj per la "komuneco de la sanktuloj", por la tuta Eklezio.

En la venontaj bultenoj ni donos ĉiujn necesajn informojn. Bonvolu ekde nun anonci vian aliĝon, akompanante tamen ĝin per antaŭpago: almenaŭ 10.000 italaj liroj; 40 DM).

6-an DE OKTOBRO: unuan dimanĉon de la monato. La Roma Esperantista Katolika Centro komencos denove siajn dimanĉajn kunvenojn per la meso en Esperanto je la 10,30 en S. Prakseda (apud S.Maria Maggiore) kaj per la sekva kunveno.
Ĉijare ni atendas niajn aliĝintojn pli nombrajn ol en la pasintaj jaroj. Travivu intense vian Esperantan vivon! Ĉiu sin preparu por la granda renkontiĝo de la katolikaj Esperantistoj en la 35a Kongreso de IKUE.

GRAVA ATENTIGO - Pro la kosto pli kaj pli kreskanta de la papero kaj de la afrankoj, ni estas devigataj ĉesigi ekde oktobro la ekspedon de nia revuo al tiuj, kiuj en 1974 ĝis nun ne abonis aŭ ne renovigis peton ricevi ĝin senpage.

Al ĉiuj ni memorigas, ke la abonkotizo por 1975 kostas it.lir. 2.000. Kaj tiuj, kiuj tuj abonas, ricevos ekde nun kaj dum la tuta jaro 1975 la revuon. Sacerdotoj kaj aliaj personoj, kiuj interkonsentis kun ni, povos, anstataŭ pagi abonon, oferi du mesojn laŭ intenco de p.Jacobitti.

Dum ĉi tiu periodo la revuo estos aparte interesa por tiuj, kiuj aliĝos al la Jubilea Kongreso, pro la instruoj, informoj kaj klarigoj, kiujn ĝi donos al la interesitoj.

NI PRETIGIS BROŜURETON en la itala lingvo, titolitan: "Notizie informative sull'Esperanto" tiel densan

da mallongaj precizaj kaj nuntempigitaj ĝis 1974 informoj pri Esperanto, ke vi certe nenie povus trovi ion pli riĉan ol ĝi. Neniu, kiu volas scii ĉion pri la Internacia Lingvo, povas neglekti ĝin. Eĉ, ĉi tiu estas laŭ ni, mirinda ŝlosilo, kiu povas malfermi multajn pordojn al Esperanto! Kurso-gvidantoj, petu tuj ĝin por viaj lernontoj! Petu por viaj amikoj, konatoj kaj simpatiantoj! Petu por via grandskala propagando.

Ĉiu ekzemplero kostas £. 100.-(ankaŭ per poŝtmarkoj).

LA TRE AGEMA PASTRO José M. Claramunt lasis la hispanan landon, kie li multe laste laboris kiel Rektoro de la granda Kolegio Samà (Escuelas Pias), por nova grava tasko en Meksikio kiel animgvidanto de granda parokejo (50.000 fideluloj) de religia sed malriĉa kvartalo. Adiaŭis lin kun ĉagreno la Esperanto-Grupoj de Villanueva y Geltrú kaj Calella, kies fondinto kaj prezidanto li estis, kaj ankaŭ la aliaj Grupoj de Katalanujo kaj Barcelono. Okaze de la Hispana Kongreso en Valladolid li same ricevis salutojn kaj bondezirojn de la multaj ĉeestantaj hispanaj samideanoj. Lia nova adreso estas: Apartado Postal 78-051, Mexico 14 D.F.

Li komunikis al ni, ke je la 30a de aŭgusto 18 junuloj eniris en la seminariejon de la Patroj de la Piaj Lernantoj (Skolopianoj). La fideluloj, kiuj multe zorgas pri vokiĝoj per preĝoj kaj vivrimedoj, faris al ili grandan feston.

INICIATE DE FERVORAJ POLAJ KATOLIKAJ Esperantistoj, la oktobra numero de "Katolika Sento" (n°10) estos grandparte dediĉita al la Pola Katolika Unuiĝo Esperantista. Ĝi tamen enhavos ankaŭ kelkajn paĝojn pri la necesaj informoj al la aliaj niaj legantoj. Bela

ekzemplo de propagando, ĉar tiuj, kiuj zorgis pri ĉi tiu numero, donis ankaŭ sian aman kontribuaĵon pri penso kaj agado.

NOVA VATIKANA serio da poŝtmarkoj aperos je la 26 septembro 1974, okaze de la 7a jarcenta datreveno de la morto de S. Bonaventuro de Banjoreĝo. Ĉu ĉi tiu eldonado havos la saman febran peton de la ĝemela pri S. Tomaso? Ĉi tiu lasta elĉerpiĝis dum tri-kvar tagoj, kvankam la eldonkvanto temis pri 1.450.000 ekzempleroj. La serio pri S. Bonaventuro konsistos el tri valoroj (£. 40, 90, 220). La unua reproduktas Banjoreĝon; la dua la "arbon de la vivo", verkon de la 13a jarcento; la tria reproduktas la sanktulon, laŭ pentristo Benozzo Gozzoli (1420-1497).

---

## El la Katolika Eklezio

---

ROMO. - PAROLI PRI LA KONGREGACIO por Kredodoktrino (eks-"Sant'Offizio") ĉiam ekscitas intereson kaj polemikojn. Eĉ ne celante la malnovan historion, ekzistas faktoj de pli-malpli freŝa dato, kiuj vekas nian atenton: temas pri teologoj, bibliistoj, skribistoj, kiuj estis vokitaj por klarigi siajn vortojn, aŭ sin defendi de akuzoj. Sed en la kadro de la reformo de la Kurio, decidita de Paŭlo 6a, estis renovigita ankaŭ ĉi tiu kongregacio kaj oni enkondukis novajn procedurojn pri la ekzameno kaj la prijuĝo de teologiaj doktrinoj. Eĉ, hodiaŭ oni emas superi ĉion, kio povus ŝajni preskaŭ-punan proceddon. La funda problemo, fak-

te, ne estas puni aŭ silentigi tiujn, kiuj esprimas opiniojn kontraŭajn al la kredo, sed prefere instrui la kredantojn kaj helpi ilin pere de la pura eklezia doktrino, por ke ili distingu la certajn verojn disde la pridiskuteblaj problemoj kaj eraraj doktrinoj.
Tio ne estas facila kaj agrabla tasko; tamen ĝi estas servado al la "Petra katedro" kaj pere de ĝi al ĉiuj fideluloj, kiuj rajtas koni, laŭebleco, ĉu iu aŭ alia teologia doktrino konkordas aŭ ne kun la katolika kredo. Pro tio la nova kongregacio ne nur prijuĝas, sed pristudas, stimulas, proponas, dialogas.
En la aktuala momento inter kristanoj ekzistas laŭdinda toleremo kaj komprenemo pri plurismo rilate al teologiaj, filozofiaj aŭ ideologiaj opinioj. Oni tamen devas rifuzi maskadon de ĉiuj problemoj sub la formulo de "laborhipotezo" aŭ de "paŝtista situacio" aŭ de"dialogo kun la kulturoj". Ĉi tiuj kategorioj estas veraj kaj utilaj, sed ili ne povas permesi, ke oni "enparentezigu" la veron, la esencan enhavon de la kredo, la mesaĝon de Kristo mem kaj la Eklezion, kian li ĝin volis. Oni do devas akcepti kaj progresigi emon al tolereco pro la konscio de la profundaj ŝanĝiĝoj okazintaj en la hodiaŭaj kulturo kaj esprimmaniero; sed oni absolute ne devas malatenti tiun "servadon al la vero", kiu estas esprimo de la karitato, tasko de la Eklezia instruado kaj garantio de certeco por ĉiu kredanto.

ĈEĤOSLOVAKIO. - PRI JARKUNVENO de la IKUE-sekcio en la Ĉeha Esperanto-Asocio raportis ĝia "Informilo" de septembro. Je la 7a de julio kunvenis sesdeko da IKUE-anoj sub prezidanteco de Aleŝ Berka. Inter ili estis pluraj alilandanoj kaj ankaŭ la IKUE-prezidanto p. Longoni. Preskaŭ 300 membroj estis reprezentitaj en la kunveno por la balotado pri la nova estraro, kiu funkciados inter 1974 ĝis 1976, kaj pro la diskutado pri

la farita laboro kaj pri la plano de nova trijara periodo.

FRANCUJO. - LA RELIKVOJ de Sankta Tomaso de Akvino, garditaj de 1791 en la preĝejo Saint Sernin de Tuluzo, estos reportitaj je la proksima oktobro en la restaŭrotan preĝejon de la Jakobenoj, kien laŭ decido de papo Urbano 5a, ili estis transportitaj en 1369. Sed de ĉi tiu preĝejo ili estis forportitaj al Saint Sernin dum la revolucio de 1789, kiam la templo, kiu gardadis sub la ĉefa altaro la restaĵojn de la "Anĝela Doktoro" estis konfiskita kaj aliigita al ĉevalarstalo. Post longaj restaŭraj laboroj. la preĝejo de la Jakobenoj, jam malfermita por kulto estos denove inaŭgurata dum la venonta oktobro, kaj je la 22a de la sama monato estos konsekrata kaj ricevos la valorajn relikvojn.

Kiel konate, la relikvoj de S. Tomaso de Akvino, mortinta je la 7a de marto 1274 en la cisterca monakejo de Fossanova, dum li vojaĝis de Napolo al Liono por partopreni en la Koncilio, estis dum multaj jaroj pretenditaj de multaj urboj, sanktejoj, universitatoj kaj ordenoj, ĝis papo Urbano 5a decidis, ke ili estu asignitaj al Tuluzo, kien ili alvenis, triumfe akceptitaj de granda fidelula amaso, la 28an de januaro 1369.

GERMANUJO. - KONTOSTATO PUBLIKA de la ĉefdiocezo de Kolonjo. "Kiel rilatas mono kun kredo ?" Tiel titoliĝas la unua ĉapitro en la kajereto eldonita de la ĉefdioceza Kurio de Kolonjo. La respondo ŝajnus negativa; sed ĝi klarigas: "komprenéble mono ne kreas kredon, sed prezenti kredon al la homoj kaj anonci al ili tion, kiel Kristo postulis de sia Eklezio, kostas iom". "Ekzemple - insistas la kajereto - ankaŭ la celebrado de la meso estas kunligata al materiaj pre-

misoj". Same kiel tagiĝe de la evangelizado, ankaŭ hodiaŭ la anonco de la evangelio kaj la liturgiaj servoj devas esti integritaj per sociaj, paŝtistaj, karitataj agadoj, kiuj ne estas kredo, tamen en ĝi ili havas siajn radikojn, kaj ofte nur tiel ili igas kredinda la veron. La demando menciita devus esti prefere formulita tiel: kion faras la Eklezio per la mono je sia dispono? La ĉefaj temoj rilatantaj elspezojn en ĉi tiu, kiel en la aliaj diocezoj, estas: komuna paŝtista laboro kaj helpoj al diasporaj komunumoj; entreprenoj sociaj, karitataj kaj kulturaj; porkultaj konstruaĵoj; **salajroj** al personalo; administrado.

La rimedoj, kiujn la katolika Eklezio havas je sia dispono venas de monkolektoj, de pluraj kontribuaĵoj, de publikaj helpoj kaj precipe de "ekleziaj impostoj", kiel konate devigaj en la religiaj konfesioj de Germanujo. La ĉefdiocezo de Kolonjo, starigita en la tria jarcento, forstrekita dum la napoleona epoko, restrukturita en 1824, estis korektita laŭ la aktualaj limoj en 1957. Laŭ teritorio ĝi estas unu el la plej malvastaj en la Federacia Respubliko; sed laŭ nombro de katolikoj ĝi estas la plej riĉa. En la universala Eklezio ĝi estas la sepa post Meksiko, San-Paŭlo, Milano, Madrido, Barcelono kaj Buenos-Ajreso. La ĉefdiocezo de Kolonjo (en la pasintaj jarcentoj ĝi transpasis ankaŭ la politikajn limojn de Germanujo) entenas gravajn regionojn de Vestfalio - Nordrejno: Bonno, Duseldorfo, Leverkuso, Remŝajdo, Solingeno, Vupertalo, ktp. En ĝia teritorio troviĝas pluraj universitatoj aŭ superaj kulturaj institutoj, gravaj industriaj kompleksoj, ĵurnaloj larĝe disvastigitaj kaj tri radistacioj: pro tio ĝi estas eklezia teritorio karakterizita per kulturaj, ekonomiaj, politikaj centroj, ne parolante pri kelkaj regionoj entute agrikulturaj.

La religia "radiografio" povus esti tiel prezentita: 812

komunumoj de fideluloj, dividitaj laŭ 61 dekanejoj, en kiuj laboras 1400 diocezaj pastroj kaj 355 religiaj. Oni devas aldoni 130 sacerdotojn okupitajn ĉefe pri lernejaj taskoj, 250 pensiitajn kaj 43 diakonojn.
La ĉefdiocezo de Kolonjo estas riĉa je monakejoj: 66 viraj kaj 340 virinaj kun entute 6200 religiulinoj; ĉiuj, kvankam diversmaniere, okupitaj por servo de la proksimulo.
El ĉi tiu diocezo foriris 920 sacerdotoj, fratinoj aŭ laikaj fratoj, por misiaj laboroj.
Tre multaj estas la sociaj entreprenoj subtenataj de la Eklezio: 681 infanĝardenoj, krom 80 direktitaj de kongregacioj aŭ asocioj, por 58.000 infanoj; 95 katolikaj hospitaloj kun 20.100 litoj; 163 ripozaj domoj por 9.200 maljunuloj; 24 gimnazioj estas vizitataj de 15.227 lernantoj; 2745 junuloj vizitadas aliajn katolikajn instituciojn; 1489 knabinoj estas inskribitaj en fakaj lernejoj por pedagogio.
Oni devas krome aldoni junularajn centrojn kaj kolegiojn por studentoj, geedzajn konsultejojn; instituciojn, kiel "amika telefono", ripozdomojn por familiaj patrinoj, institutojn por patrinaj knabinoj kun iliaj filoj, urĝajn kuracejojn, ekleziajn akademiojn, centrojn por eksterlandaj laboristoj, instituciojn por preso, radio kaj televido, bibliotekojn.
Ekzistas krome eksterdiocezaj entreprenoj, financitaj de Kolonjo: en Tokio kaj en Fortalezo, en Skandinavaj regionoj kaj en Sankta Lando. Por ĉi tiuj entreprenoj estas je dispono de respondeculoj en la ĉefdiocezo, por 1974 512.816.000 markoj (ĉirkaŭ 120 miliardoj da italaj liroj), kies plejparto devenas de la supre menciitaj ekleziaj impostoj. Aparta celo - estas necese substreki ĝin - laŭ la kontolisto de la ĉefdiocezo estas dediĉata al la paŝtista zorgo inter eksterlandaj laboristoj, tre nombraj: 85.000 italoj, 38.000 hispa-

noj, 13.500 portugaloj, 40.000 kroatoj kaj slovenoj, mil hindoj, 1150 filipinoj por totalo de 179.000 personoj. Por ĉi tiuj estis asignitaj ĉijare 5.677.000 DM., tiamaniere: por paŝtista laboro 1.467.000; honorarioj al eksterlandaj pastroj 1.371.000; honorarioj al sociaj asistantoj 1.333.000; centroj, loĝejoj por laboristaj gastejoj 1.500.000.
La disponata mono estas sendube granda; sed la entreprenoj, kiuj per ĝi estas subtenataj estas senmezuraj, kaj favoras nepre kredindecon de la Eklezio la publikado de la kontoj pri el- kaj en-spezoj.

LA INSTITUCIO "S.Bonifaco" memorigos sian 125an vivjaron. Fakte je la 4a de oktobro 1849, dum la tria "Katholikentag" estis lanĉita la propono pri germana institucio laŭ misia karaktero por asisti tiujn katolikojn, kiujn la landa komenciĝanta industriigo dispelis en regionojn plejparte protestantajn. Plenakorde oni donis al la iniciato la nomon Sankta Bonifaco, apostolo de la germanoj, kies relikvojn oni gardas en Fulda.

Helpe de la tielandaj katolikoj la "Bonifatiuswerk"dum siaj 125 vivjaroj kapablis starigi en la diasporaj teritorioj pli ol 5.000 organizojn: preĝejoj, infanĝardenoj, lernejoj, loĝejoj por klerikoj kaj laikoj. Post la dua tutmonda milito la "Bonifatiuswerk" helpis multajn rifuĝintojn, kiuj perdis ĉion, retrovi sian religion, eĉ se ili estis malproksimaj de siaj originaj parokoj, donante al ili novajn fortojn por subteni ilian tiom pezan sorton.

Pluraj germanaj episkopoj dum ĉi tiuj tagoj esprimis sian aprobon por la aktiveco de la institucio. Kard.Jaeger, kiu ĝis junio de la ĵus pasinta jaro gvidis la ĉefdiocezon de Padeborn, reliefigis, ke ĝi kontribuis"konstrui, organizi, formigi la kredon" ĉe milionoj da ger

manoj, "veki iliajn religiajn fortojn kaj kunigi ilin al la komunumo".

Hispanujo. - LAŬ LA NOVA GVIDILO de la Eklezio en Hispanujo, la diocezaj pastroj, kiuj laboras en la 64 ekleziaj distriktoj de la ŝtato, estas 24.481, kun malpliigo de ĉirkaŭ 700 unuoj kompare al la antaŭaj jaroj.
La diocezoj, kiuj havas la plej grandan nombron da diocezaj pastroj estas tiu de Pamplona, kun 1068; Santiago de Kompostelo kun 1065; kaj Valencio kun 1010. La hispanaj religiuloj estas pli ol 31 mil, el kiuj pli ol 16 mil sacerdotoj. La plej multnombra instituto estas tiu de la Marianistoj.
La statistikoj reliefigas pli grandan malkreskon de vokiĝoj inter la plej multnombraj institutoj, dum aperas relative alta la nombro de la novicoj de pli malgrandaj institutoj. Tiel la Kombonanaj misiistoj, kiuj havas en Hispanujo nur 238 membrojn, havas 32 novicojn,la saman kvanton de la kandidatoj akceptitaj en la hispanaj noviciejoj de la Societo de Jesuo.

Italujo. - RENKONTIĜO DE LA ESTRARO de la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj okazis en Raveno (Italujo) la 9an de junio. Partoprenis d.ro A. Duranti, prez. de la I.A.B.O., prof. H.Paruzel nova redaktoro de Biblia Revuo, A.Gambuti, librotenisto kaj p.A.Ciccanti konsilisto.
La altnivela revuo, kiu hodiaŭ celebras dek jarojn de sia vivo, sin prezentas tre belaspekte pro la brila kovrilo, la bona kvalito de la papero kaj fajneco de presliteroj, sed ĉefe pro la enhavo, entute en Esperanto, pri sciencaj artikoloj rilatantaj Biblion. Parolante pri la evoluo kaj pri la laborplanoj de la asocio kaj de ĝia organo, la prezidanto anoncis oficialan starigon de

Komitato por Esperantigo de la Bibliaj nomoj kaj donis informojn pri la progreso de la Nova Ekumena Traduko de la Sanktaj Skriboj. La unua kaj la dua numeroj de ĉi tiu jaro, kiuj ĵus aperis, estis grandparte verkitaj de la nova redaktoro, kiu tiel sin forte prezentas.

Pollando. - INICIATE DE LA KATOLIKAJ polaj esperantistoj estis organizitaj Spiritaj Ekzercoj per la internacia lingvo, en la pilgrimloko Gostyn, regiono Poznań de Pollando, sub la direkto de sac. Jozefo Zielonka, el Tarnow. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 katolikaj esperantistoj kaj unu pastro de la Malnovkatolika religio el Germana Demokrata Respubliko (v. foton). La partoprenintoj konsistis el grupo ĉeĥoslovaka (18 personoj), el esperantistoj de Hungarujo, de GDR kaj de Pollando. Ĉiuj konstatis kiel ĝojigaj kaj fruktoriĉaj estis tiuj spiritaj ekzercoj.

Aparte interesa estis la prediko de episkopo Tadeusz Etter el Poznań , kiu celebris por la esperantistoj la sanktan meson sabate 10.8.1974. Li volis ankaŭ afable resti ĉe ili, partoprenante en la komuna manĝado. La postan tagon li venis denove por celebri meson por virinoj; sed li invitis ĉiujn aliajn esperantistojn ĉeesti en la meso kaj akompani ĝin per kantoj. En sia prediko li alparolis la ĉeestantojn, laŭdante ilian katolikan movadon. Post la meso la episkopo montris deziron ricevi la sonbendojn de la meskantoj. La fervora prezidanto de la ĉeha sekcio de katolikaj esperantistoj dum la renkontiĝo, ilustrante la historion kaj la celojn de la movado, memorigis pri P.E.Peltier, fondinto de Espero Katolika kaj pri D.ro A.Eltschner el Prago, la esperantista episkopo, kiu bildigis la verdan stelon kun kruco en sia blazono. Ankaŭ la superuloj de la religia domo S.Filipo Neri, kiu disponigis la bazilikon



por la Spiritaj Ekzercoj, invitis la esperantistojn por la sama celo en la venontaj jaroj.

JEZUITOJ EN POLLANDO. La aktiveco de la Societo de Jesuo en Pollando estas riĉe ilustrita per artikolo publikigita de ĵurnalo "Zycle i Mysl" post tutmonda trarigardo pri la situacio de la Jezuitoj. Ĉi tiuj alvenis en Pollandon en 1564, pro la insistaj petoj de kard. Hozjusz, kiu akceptis ilin en Braniewo de Warmia. La Jezuitoj estis jam bone konataj en Pollando. Pro tio ilia alveno estis kaŭzo de ĝojo el unu flanko, kaj de timoj el la alia. Alberto de Prusujo estis konvinkita, ke la kardinalo portis kun si "legion da 1200 kavaliroj konkeravidaj". Sed fakte al Braniewo alvenis nur naŭ religiuloj, similaj al ĉiuj aliaj.
Komence, la aktiveco de la jezuitoj koncentriĝis sur la lernejan sektoron, kiun ili prijuĝis esenca por la renaskiĝo de la katolikismo. En siaj lernejoj, ne malzorgante aliajn sektorojn, ili donis grandan parton al la ekzaktaj sciencoj kaj al la eksperimenta metodo, instruante konstruarton, funkciadon de akvoduktoj, kaj interalie ankaŭ militarton. La teatra arto havis gravan funkcion en ilia eduka procedo.
La jezuitaj lernejoj havis sian tajdon. Io tamen estas certa: je la momento de ilia ordenforigo, en 1773, la sesdekses jezuitaj lernejoj konsistigis la pli grandan parton de la nacia instrua reto; pro kio la tuta sistemo de la publika instruado falis en krizon ."Dum la tempo de jezuitoj la lernejoj akceptis kvin-ses-cent lernantojn, - oni legas en la "Historio de la pola kulturo" de Bruxkner -; sed post ilia forigo en ĉiuj lernejoj la nombro malkreskis, tiel ke multaj el ili devis fermiĝi". Kiam reĝo Stanislao Aŭgusto lanĉis alvokon por reformo de la lernejoj, estis eks-jezuitoj kiuj efike zorgis pri tio. Sen jezuitoj estus malfacile imagi la hi

storion de la pola kulturo.

Jezuito estis la patro de la pola ĵurnalismo, StefanLuskina, fondinto de "Gazeta Warszawska"; kaj pro agado de polaj jezuitoj estiĝis la plumulto de la periodaĵoj de la 18a jarcento: "Monitor", "Kurier extra-ordynaryjny", "Kurier Polski", "Kurier Warszawski" kaj "Zabawy Przyjemme i Pozyteczne" kaj aliaj.

Nomoj de jezuitoj troviĝas en la disvolviĝo de ĉiuj naturaj kaj teknikaj sciencoj, ĉefe en arkitekturo. La jezuita mecenateco donis gravajn fruktojn en la kampo de la sanktaj konstruaĵoj. La vortaro de la jezuitaj artistoj donas la nomon de preskaŭ kvarcent pastroj inter arkitektoj, krom skulptistoj kaj pentristoj. Sed ili ĉiam direktis la arton, laŭ sia vokiĝo, al apostolado.

Kvankam la jezuitoj ĉiam celis organizi kolegiojn en la grandaj urboj, ili tamen neniam neglektis - kiel skribas la artikolisto - "penetri en la arbarojn de Karpatoj, de Litovio kaj de Samojedo; ili atingis la kabanojn de rezinkolektantoj en la arbaro de Chojnice; pelitaj de misia fervoro ili atingis la ekstremaĵojn de Rutenio, ĝis la sovaĝaj Karpatoj, riskante la tataran sklaviĝon". La laboro farita meze de la humila popolo estas glora paĝo de ilia historio en Pollando.

DISVOLVIĜIS EN ĈENSTOKOVO la 38a tutnacia pilgrimado de la universitata junularo, kun partopreno de multaj miloj da junuloj. Tiuokaze la pola primaso, kard. Wyszynski predikis en la sanktejo de la Nigra Madono admonante la junulojn, ke ili enprofundigu sian kredon kaj atestu ĝin kuraĝe en la medio, en kiu ili vivas. La purpurulo menciis ankaŭ pri la sekulariga kaj laikiga evoluo, kiuj korodas la socion, asertante, ke socia kaj nacia vivo ne povas bonorde disvolviĝi krom per la observo de la dia leĝo pri amo al Dio kaj al la proksimulo.

Turkujo. - KRISTANAJ MEMORAĴOJ de la pratempa Eklezio.

En nia "Katolika Sento" 9 (1973) paĝ. 221 ni menciis pri la tradicio de la tombo de la tre Sankta Virgulino Maria en Jerusalemo. Post tiu artikolo ni ricevis petojn de klarigoj, pro la alia malsama tradicio, laŭ kiu Maria loĝadis kaj mortis en Efezo. El artikolo de Yorgi Kefalidis, aperinte en "L'Osservatore Romano" 23 jun. 1974, ni responde transprenas:

Kiam la Apostoloj forlasis Jerusalemon, ankaŭ Johano inter la 37a kaj 42a jaro, kune kun la patrino de Jesuo, kiu estis konfidita al li de Kristo mem, iris en Malgrandazion, asignitan al li kiel misionon.

La grupo konsistis el Maria, patrino de Jesuo, el Johano kaj el kelkaj piaj virinoj, inter kiuj Maria Magdalena. Tiel laŭ la opinio de ses bizantaj historiistoj (v. Du Cange) la virgulino Maria mortis en Efezo, kie oni montriĝas el ŝia tombo en la "Grotoj de la Sep Dormantoj"; hodiaŭ malplena.

La loĝado de Johano en Efezo estas abunde dokumentita per la unuanima atesto de la ekleziaj patroj kaj de la historiistoj, kiuj konkorde atestas, ke li evangelizis Malgrandazion, kaj probable li ankaŭ fondis tiujn komunumojn de kredantoj, kiujn Sankta Paŭlo trovis en Efezo, kiam li alvenis tien dum sia tria misia vojaĝo, en la 53a jaro.

Efezo en Lidio, ĉe la bordoj de la Eĝea maro, apud la enfluejo de la Kajstra rivero, hodiaŭ ne plu ekzistas, sed oni vidas ĝiajn ruinojn tri kilometrojn de Selĉuk, situanta 75 km. sude de Smirno (Izmir).

Je la tempo de la apostolo, Efezo estis unu el la plej famaj Anatoliaj urboj, komerca kaj kultura centro inter la plej gravaj de Mediteraneo. Atestas pri ĝia grandeco la imponaj ruinoj de ĝiaj plej grandaj konstruaĵoj: la templo de la Artemisa (6a jarcento a.K), la

muroj de Lisimako, la Stadiono, la Arkadia strato, la Termobanejoj de Skolastika, la Gimnazio, la Biblioteko de Celso, la "Odeono"... fine la baziliko de Sankta Johano kaj la duobla preĝejo nomata de la Koncilio, kie en la 431 j.celebriĝis la Koncilio, kiu proklamis la Virgan Marian "Theotocos", tio estas "Patrino de Dio".

Unua el la Sep Eklezioj de la Apokalipso, Efezo estis tiam la eklezia ĉefurbo de Malgrandazio, kaj en ĝi, inter 195-198 kaj 475-477 estis celebritaj eĉ kvin Koncilioj.

Johano fiksis sian rezidejon en la ĉirkaŭaĵoj, ĝuste - kiel siatempe diris S.Gregorio de Tours (538-594) - "ekster la muroj", en domo, kiu je la epoko de la sama aŭtoro ŝajnis "kvarmura kaj sentegmenta sur monto apud la urbo", je 7 km. de la ruinoj de Efezo.

Bedaŭrinde dum la longaj kaj teruraj jaroj de la muzulmana invado, la memoraĵoj de tiu loko perdiĝis, kaj verŝajne ili estus hodiaŭ nura espero, se iu providenca evento ne estus doninta al ni ĝian reeltrovon. Je la duono de la ĵus pasinta jarcento aperis la franca eldonaĵo "Vivo de la Sankta Virgulino" laŭ la revelacioj de la Diservantino Katerina Emmerick ( 1825) el Düllmen en Renanio. Emmerick priskribadis kun mirinda ekzakteco la lokon de Efezo kaj la karakterizojn de la lasta loĝejo de Maria sur monto apud al la urbo.

La franca sacerdoto Gouyet estis skuita je ĉi tiu legado kaj decidis, ne sen malfacilaĵoj, vojaĝi de Parizo al Smirno, por serĉi tra la efezaj montoj "plenaj de rabistoj", la domon, en kiu Maria pasigis siajn lastajn vivojarojn.

Estis la 1881a jaro, kiam Gouyet alvenis al Smirno : kun la libro de Emmerick enmane, ne sen surprizo li

malkovris la lokon kaj la domon entute laŭ la priskriboj de Emmerick; sed bedaŭrinde li ne sukcesis veki la generalan indiferentecon.
Dek jarojn poste, la samaj esploradoj estis entreprenitaj de Eŭgen Poulin kaj de la klera, sed skeptika doktoro Jung, kun la celo aŭ trovi la lokon priskribitan, aŭ dementi tiujn revelaciojn; kaj post longaj kaj lacigaj priserĉadoj laŭ la informoj donitaj de Emmerick kaj de kelkaj lokaj kamparanoj, la skeptikaj esploristoj trovis, fine, ĉe Panaya-Kapulu, disfaliĝintan konstruaĵon, kiu respondis entute al la priskribo. Ili trovis la "domon de la Virgulino Maria"!

La priskriboj de Emmerick akordiĝis do ankaŭ kun la loka tradicio, kiu aranĝis, jam de longe en tiu domo kapelon, al kiu oni venis de la ĉirkaŭaĵo ĉiujare je la 15a de aŭgusto. Temis pri Grekoj, kiuj, kvankam ilia Eklezio akceptis la tradicion de la morto de la Virgulino Maria en Jerusalemo, ili tamen firme kredis, ke ŝia morto okazis en ilia tero. En tiu loko eĉ la muzulmanoj honoris la Virgulinon Maria, nomante ŝin "Hazreti Meryem Ana", kio signifas: "Maria, la majesta" patrino de Hazreti Isa.
El la evangelioj oni havas neniun alian informon pri forlaso de Maria el Palestino, krom okaze de la fuĝo al Egiptujo (Mat.2:13).
Sed proskribante la morton de Jesuo sur la kruco, Johano, aŭtoro de la kvara evangelio, diras pri si: "De tiu momento la Disciplo tenis ŝin ĉe si" (Joh.19:27) .
Post ĉi tiuj vortoj dum tri jarcentoj neniu aŭtoritata atesto parolis pri ŝi, kvazaŭ por respekti la misteran silentadon de la apostoloj pri tio.
Iu dokumento de la Patroj de la Efeza Koncilio (431 j.) estas unu el la unuaj atestoj, ke, laŭ la plej serioza kaj pravigita tradicio, Maria kaj la apostolo Johano loĝadis kaj vivis en Efezo.

Cetere en Efezo estis montrata la tombo de la Apostolo, kaj jam de longa tempo ekzistis tie, dediĉita al la tre Sankta Virgulino, grandioza baziliko, tiam unika en la mondo kaj antaŭ al ĉiu ajn maria preĝejo de Romo, Konstantinoplo, Jerusalemo aŭ de alia loko.
Fakte, la efeza baziliko apartenas al la Konstantena epoko (Konstanteno mortis en 337), dum la romaj bazilikoj de S.Maria la Granda sur Eskvilino kaj de S.Maria Transtibera estis dediĉitaj al Maria post unu jarcento, la unua, kaj eĉ pli poste la dua. Vere estas, ke papo Liberio (352-366) konstruis bazilikon sur la Eskvilina monteto, apud la buĉejo de Livia, ĉar pri tio precize informas nin la "Liber Pontificalis de Liberio" n. 52; sed ĉi tiu baziliko estis dediĉita al la tre sankta Virgulino nur de Ksisto 3a (432-440), post kiam li restaŭris ĝin, laŭ la sama libro, kiu atestas: Ksisto 3a konstruis ĉi tie la bazilikon de sankta Maria, kiu antaŭe estis nomita de Liberio, apud la buĉejo de Livia...". Al ĉi tiu antaŭeco oni ne povas doni pli logikan kaj konvinkan motivon, krom tiun devenantan de la tradicio, laŭ kiu Maria loĝadis kaj mortis en Efezo. Des pli, ke la startpunkto de la liturgia kulto al Maria en la mondo, post la katakomboj, estis laŭ la historio, la Efeza Koncilio de la 431 jaro.

KATOLIKA OFICEJO por turistoj. Oficejo por informoj kaj spirita asisto al turistoj en Istanbulo estis malfermita de la dominikana patro Fazzi. La iniciato celas respondi al la pli kaj pli kreskanta pliigo de katolikoj, kiuj vizitas Malgrandazion, kaj pro tio haltas en la Istanbula metropolo.

Formozo. - EN LA ŜIRMITA STADIONO de Kiayi okazis celebrado por la Sankta Jaro. La dek mil sidlokoj de la stadiono estis entute okupitaj precipe de ses

mil lernantoj de la katolikaj lokaj lernejoj. Ĉiuj junuloj havis sian uniformon, ĉiu grupo sian standardon. Celebris la meson kard. Yu Pin kun la episkopoj de la lando kaj kun pli ol cent sacerdotoj, kiuj helpis en disdono de la Eŭkaristio en ĉiuj sektoroj de la stadiono. Fine de la meso, dum ĉiu havis bruligantan kandelon, oni legis preĝformulon por sinkonsekro al la Madono. La cerimonio multe impresis la ĉeestantaron. En monkolekto por helpo al malriĉuloj oni ricevis sumon de ĉirkaŭ du mil kvincent usonaj dolaroj.

Hongkongo. - ANGLIKANA - KATOLIKA AKORDO pri bapto. La ekumena movado, kiu ne estas freŝdata, estas vigla en Hongkongo, ĉefe inter katolikoj kaj anglikanoj. Multaj iniciatoj en la socia, eduka, saniga kampo estas komune entreprenataj. Periode okazas renkontiĝoj kaj porspiritaj tagoj, en kiuj partoprenas katolikaj pastroj kaj protestantaj pastoroj. En la ĉiutaga publika celebrado de la festo honore al Kristo Reĝo partoprenas la plejparto de la estroj de la pluraj lokaj konfesioj. Dum la pasintaj jaroj tre bone sukcesis la iniciato de la interŝanĝo de pupitroj inter la katolika kaj la anglikana episkopoj. La anglikana d.ro Gilbert Baker predikis en la katolika katedralo kaj mons. Hsu en la anglikana. Mons. Hsu estis antaŭvenanto kaj animanto de la ekumena laboro en Hongkongo. Lia aktiveco hodiaŭ estas fervore daŭrigata de lia posteulo, mons. Lei (mons. Hsu mortis dum la ĵuspasinta majo). Katolikoj kaj protestantoj troviĝas en Hongkongo ekde 1842 (la protestantoj konstruis sian unuan preĝejon en 1842; la katolika misio estis starigita prefektujo en 1844). Hodiaŭ la protestantoj en la tuta teritorio estas preskaŭ 80.000, apartigitaj laŭ 60 malsamaj konfesioj. La katolikoj estas 285.000 kun 47 parokoj kaj 18 kapeloj.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* | **1500** |
| *Abonkotizo* *italliroj* | **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE